

La Rakonto de Satampro Zejroŝ



Clark Ashton Smith

La Rakonto de Satampro Zejroŝ

aŭtorita de

Clark Ashton Smith

tradukita de

Ĝan Ŭesli Starling

eldonita je

2016-08-23

Antaŭparolo

Vortaro: Vidante vorton ‘[ĉi-aspektan](#)’ (sen citiloj), ŝvebu super ĝi per fingropinto aŭ muso kaj ekvidu, ke ĝi ŝanĝiĝos por aspekti ‘[tiel ĉi](#)’. Per tio vi scios ke tiu vorto havas difinon en la provizita vortaro. Klaku ĝin por ekvidi ties difinon. Post legi la difinon, atentu pri la komenco-vorto de la difino, kiu aspektos kiel ‘**difin/o**’. Klaku tion por salti reire al la rakonto.

Se sur via aparato ligiloj ne aspektas kiel supere, tio rezultas de afero kie la niaj [CSS](#)-aj reguloj super-regiĝus fare de interna sistemo de via propra aparato: [Nook](#), [Kobo](#), [Kindle](#), ktp. Do, substrekoj povas aperi *malgraŭ* niaj specifaj elektoj. Kulpigu la propran aparaton tiukaze.

Ni provis elekti mezan stilon post demandi ĉe Fejsbuko kaj alie pri diversaj personaj preferoj. Ni ja volas provizi elekton al ĉiu leganto. Bedaŭrinde, tio nuntempe ne eblas. Solvo devas atendi ĝis la plimulto el bitlibraj aparatoj subtenos la formaton [EPub 3](#), kio permesos funkcion pri elekto inter stiloj pere de [JavaScript](#). Sed [EPub 2](#), per kio la plimulto el aparatoj ankoraŭ funkcias, ne ebligas tiajn elektojn.

Ni elektis difini nur la niaopinie maloftajn vortojn. Bonega helpo por esperantaj progresantoj, nur iometa helpo por komencantoj. Se viaopinie, plua vorto bezonas difinon, kontaktu nin, kaj ni aldonos.

Fine sciu, ke ajna leganto rajtas peti aldonon de plua difino en la vortaro. Kontaktu la eldonejon epoŝte or sugesti pri tio.

Propraj Nomoj: Plejparte ni lasis, ke propraj nomoj restu kiel eble plej proksimaj al la originalo. Tamen, por eviti falsajn sufiksojn ‘-an’, ‘-os’ ktp, ni opiniis tion dece, ke ni faru necesajn ŝanĝetojn.

Angla Titolo: La anglalingva originalo ankaŭ portis latinlingvan titolon kiel *The Tale of Satampra Zeiros* en ĉiuj ĝiaj eldonoj ekde unua

eldoniĝo je 1932. La versio, kiun ni sekvis en tradukado devenis el *The End Of The Story: Volume One of the Collected Fantasies of Clark Ashton Smith*, kopirajto 2007, ISBN 978-1-59780-028-0

La Rakonto de Satampro Zejroŝ

Mi, Satampro Zejroŝ el Uzuldaromo, skribos per la mano maldekstra, ĉar mi ne plu havas ajnan alian, la rakonton de ĉio, kio okazis al Tiroŭv Ompalioŝ kaj mi mem en la sanktejo de la dio Caĥhagŭo, kio situas neprizorgata fare de la adorado de homoj en la ĵangal-prenitaj ĉirkaŭurboj de Komoriomo, tiu longe forlasita ĉefurbo de la reĝoj de Hiperborio. Mi skribos ĝin per la viola suko de la súvana palm-arbo, kiu ŝanĝiĝas en sange ruĝan literaron tra la pasado de jaroj, sur forta **veleno**, kio fariĝis el la haŭto de la **mastodonto**, kiel averto al ĉiuj bonaj ŝtelistoj kaj aventuristoj kiuj eble aŭdos iun mensogantan legendon pri la perditaj trezoroj de Komoriomo kaj pro tio tentiĝos.

Nu, Tiroŭv Ompalioŝ estis mia tut-viva amiko kaj mia fidinda kunulo en ĉiuj tiaj entreprenoj, kiaj bezonas lertajn fingrojn kaj mens-kutimon kiu estas kaj eke facilpova kaj lerta. Mi rajtas diri, sen flati aŭ mi mem, aŭ eĉ al Tiroŭv Ompalioŝ, ke ni plenumis ĝis preterkompara sukceso, pli-ol-unu taskon tian, de kio sam-metiistoj el multe pli vasta fameco ol ni mem ja eble fortiriĝus pro konsterniĝo. Por diri pli malkaŝe, mi referencas al la ŝtelo de la juveloj de Reĝino Kunambria, kiuj stokiĝis en ĉambro kie kvardek venenaj reptiloj vagadis laŭvole; kaj la rompo de la senceda skatolo de Akromo, en kiu estis ĉiuj el la **medalioj** de frua dinastio Hiperboriaj reĝoj. Pravas, ke kaŝa vendado de tiuj ĉi medalioj estis malfacila kaj danĝeriga, kaj ke ni vendis ilin kontraŭ prezo kare ofertema al la kapitano de barbara ŝipo de la malproksima insulo Lemurio; malgraŭ tio, la rompo de la skatolo estis glora farego, ĉar ĝi devis fariĝi en absoluta silento, pro la proksimeco de dek du gardistoj, ĉiu armita per tridento. Ni uzis tre raran kaj mordeman acidon ... sed maldecas, ke mi lantos tro longe kaj tro parolemaĉe pri flankaferoj, malgraŭ tio, kiom ajn grandas la tento, ke mi paroladi diverse inter heroaj memoroj kaj la moda gloro de bravegaj kaj lertoplenaj faritaĵoj.

En nia okupo, kiel en ĉiuj aliaj, la malbonvenaj sorto-ŝanĝiĝoj ofte bezonigas pritraktadon; kaj la diino Ŝancino ne ĉiam disponas pri siaj favoroj. Do sekvis, ke Tiroŭv Ompalioŝ kaj mi, je tiu tempo pri kio skribas, trovis nin en cirkonstanco de enspeza elĉerpiteco, kio, kvankam dumtempa, tamen estis ekstrema, kaj estis tre malkonvena kaj agaca, sekvante, kiel tiam okazis, tuj post pli prosperaj tagoj, kaj eĉ pli profitodonaj meznoktoj. Homoj jam fariĝis blasfeminde avaraj pri siaj juveloj kaj aliaj valoraĵoj, fenestroj kaj pordoj estis fiksiĝis per duoblaj ferm-stangoj, novaj kaj konfuzigaj seruroj uziĝis, gardistoj fariĝis pli atentemaj aŭ malpli dormemaj — por diri mallonge, ĉiuj el la naturaj malfacilaĵoj de nia profesio estis multobliĝintaj. Je iu tempo ni reduktiĝis al la ŝtelado de pli masivaj kaj malpli karaj komercaĵoj ol tio de nia kutima merkato. Eĉ nun, estas humilige rememori pri la nokto je kiu ni preskaŭ kaptiĝis kun sako de ruĝaj ignamoj; kaj mi mencias ĉion ĉi por ke mi ne ŝajnu laŭ ia grado memgloriga.

Iun vesperon, en strateto de la pli humila kvartalo de Uzuldaromo, ni haltis por kalkuli niajn spezeblajn havaĵojn, kaj trovis, ke inter ni ambaŭ, ni havis precize tri pázurojn — sufiĉe por aĉeti grandan botelon de granata vino aŭ du bakaĵojn da pano. Ni debatis la problemon de elspezado.

“La pano,” kontestis Tiroŭv Ompalioŝ, “servos por nutri al ni la korpojn, provizos al ni novan kaj pli ekspedan forton al niaj elĉerpitaj membroj, kaj al niaj perlabore difektitaj fingroj.” “La granata vino,” diris mi, “nobligos al ni la pensojn, inspiros kaj lumigos niajn mensojn, kaj eble montros al ni modon por eskapi niajn nuntempajn malfacilecojn.” Tiroŭv Ompalioŝ cedis sen malnecesa argumento al mia supera rezonado, kaj ni iris cele al la pordoj de apuda taverno. La vino ne estis el la plej bona, koncerne je gusto, sed la kvanto kaj forteco estis ĉiom, kiom dezirindas. Ni sidis en la hom-plena tavern, kaj trinketis ripozeme, ĝis ĉiom el la fajro de la brile ruĝa likvoro jam transmisiis sin en niajn cerbojn. La malheleco kaj pridubindeco de niaj futuraj vojoj prilumiĝis tiel, kvazaŭ per la lumo de rosaj lum-flamingoj, kaj la malagrabla aspekto de la mondo mirakle tiel moliĝis. Poste, venis al mi nova inspiro.

“Tiroŭv Ompalioŝ,” mi diris, “ĉu ekzistas ajna kialo pro kiu vi kaj mi, kiuj estas bravaj viroj kaj neniel viktimoj de la superstiĉoj de la plimulto, ne havigu al ni mem la reĝaj trezoroj de Komoriomo? Vojaĝo unu-taga de tiu ĉi teda urbeto, plaĉa vizito en la kamparo, posttagmezo aŭ antaŭtagmezo de [arĥeologia](#) esplorado — kaj kiu scias tion, kion ni eble trovos?” “Vi parolas saĝe kaj brave, kara amiko mia,” respondis Tiroŭv Ompalioŝ. “Ja prave, ekzistas nenia kialo pro kiu ni ne replenigu niajn elĉerpitajn financojn je la elspezo de kalkaj mortintaj reĝoj aŭ dioj.” Nu, Komoriomo, kiel la tuta mondo scias, estis forlasita multajn jarcentojn antaŭe pro la aŭguro de la Blanka Sibilo de Polariono, kiu antaŭdiris ne priskribitan kaj [abomenindan](#) pereon por ĉiuj mortuloj kiuj riskos restadi inter ĝiaj ĉirkaŭejoj. Kelkaj diras, ke tiu ĉi pereado estis malsaneco kio estus vieninta de la nordaj senhomeoj tra la vojoj de ĝangalaj triboj; aliaj, ke ĝi estis formo de freneziĝo; kia ajn, neniue, nek reĝo nek pastro nek vendisto nek laboristo nek ŝtelisto, restis en Komoriomo por traloĝadi ĝian alvenon, sed ĉiuj foriris en sola migrado por starigi, je distanco de unu-taga vojaĝo, la novan ĉefurbon, Uzuldaromo. Kaj strangaj rakontoj diriĝas, pri hororoj kaj teruroj ne alfrontindaj aŭ supereblaj de homo, kiuj hantas por ĉiam poste la sanktejojn kaj [maŭzoleojn](#) kaj palacojn de Komoriomo. Kaj ankoraŭ ĝi restadas, [glaceaĵo](#) el [marmoro](#), grandiozaĵo el [granito](#), tute plen-plena de turpintoj kaj [kupoloj](#) kaj [obeliskoj](#) kiujn la grandegaj arboj ankoraŭ ne estis superkreskintaj, en fekunda enlanda valo de Hiperborio. Kaj homoj diras, ke en ĝiaj nerompitaj trezorĉambroj kuŝadas en sia tuto kaj nerabita kiel en antikvaj tempoj la riĉan trezoron de antikvaj reĝistoj; ke la alte konstruitaj tomboj daŭre tenadas la juvelojn kaj elektrumon kiuj entombiĝis kune kun siaj [mumioj](#); ke la temploj ankoraŭ havas siajn or-stelajn ujojn kaj meblojn, la [idoloj](#) siajn valoregajn juvelojn en oreloj kaj buŝo kaj naztruoj kaj umbiliko.

Mi pensas, ke ni estus tiun nokton mem elirintaj, se nur ni estus havintaj la kuraĝigon kaj inspiron de dua botelo de granata vino. Kiel fakte okazis, ni decidis komenci je frua sunleviĝo: la fakto, ke mankis al ni mono por nia vojaĝo estis malmulta afero, ĉar, krom se nia antaŭa lerteco tute malsukcesus al ni, ni povus elpreni modestan kvanton da malvola [tributo](#) de

la malruzaj popolanoj de la kamparo. Dumtempe, ni reiris al niaj loĝejoj, kie la proprietulo renkontis nin kun malvoleta bonvenigo kaj tre malĝentila postulo por sia mono. Sed la ora promeso de la morgaŭo jam armis nin kontraŭ ĉiuj tiaj bagatelaj agacoj, kaj ni gestis malatentige al la ulo per tia malestimo, kia ŝajnis mirigi lin se ne lin venki.

Ni dormadis malfrue, kaj la suno jam estis tiam leviĝinta alte kontraŭ la [lazura](#) alteco de la ĉielo kiam ni eliris la urbopordojn de Uzuldaromo kaj suriris la nordan vojon kiu kondukas al Komoriomo. Ni matenmanĝis bone sur kelkaj [sukcenaj](#) melonfruktoj, kaj ŝtelita birdo, kiun ni kuiris inter la arbaro, kaj poste rekomencis nian vojaĝadon. Spite al laciĝo, kio pligrandiĝis al ni je la tagfino, nia vojaĝo estis plaĉa afero, kaj ni trovis multon por distri nin en la variaj pejzaĝoj tra kiuj ni pasis, kaj en iliaj popoloj. Kelkaj el tiuj ĉi popoloj, mi certas, devas ankoraŭ memori nin kun bedaŭro, ĉar ni ne malpermesis al in mem ion ajn haveblan kio tentis al aŭ niaj deziroj aŭ niaj apetitoj.

Estis plaĉa regiono, plena de bienoj kaj frukt-arbaroj kaj fluantaj akvejoj kaj verdaj, floraj arbaroj. Fine, iam dum la posttagmezo, ni venis al antikvan vojon, longe neuzitan kaj preskaŭ plene surkreskitan fare de vegetaĵoj, kiuj kuras de la ĉefa vojo tra la maljuna ĝangalo al Komoriomo.

Neniu vidis nin eniri tiun ĉi vojon, kaj post tiam ni renkontis neniun. Per unu sola paŝo, ni pasis tute elde homa priscio; kaj ŝajnis, ke la silento de la arbaro ĉirkaŭ ni estis kuŝinta nealtrudita fare de homa piedfalo ek de la eliro de la legenda reĝo kaj lia popolo antaŭ tiom multe da jarcentoj. La arboj grandis pli ol iuj ajn jam viditaj de ni, kaj interplektiĝis kiel senlima [labirinta](#) amaso, la internaj araneje similaj kunvolviĝoj el grimpo-plantoj preskaŭ samaĝaj kiel ili mem.

La floroj estis malnature grandaj, iliaj petaloj montris aŭ mortan palecon aŭ sangan ruĝecon; kaj iliaj odoroj estis aŭ netolereble dolĉaj aŭ putraj. La fruktoj laŭlonge de nia vojo estis grandegaj, kun purpuraj kaj oranĝaj kaj rustaj koloroj, sed iel ni malvolis riski manĝi ilin.

La arbaro fariĝis pli densa kaj sovaĝa dum ni iradis plu, kaj la vojo, kvankam pavimita per granitaj plataĵoj, estis pli kaj pli surkreskitaj, ĉar arboj jam enradikigis sin en la intersulkoj, ofte disigintaj la larĝajn blokojn per forto. Kvankam la suno jam ne proksimiĝis al la horizonto, la ombroj ĵetitaj sur nin fare de la gigantaj arbo-trunkoj fariĝis ĉiam pli densaj, kaj ni moviĝadis inter malhel-verda krepusko timige plena de subpremigaj odoroj de luksa kreskado kaj de vegetaĵa putriĝo. Estis neniuj birdoj aŭ bestoj, kiaj oni pensas estus plenigantaj bonsanan arbaron, sed je raraj interspacoj, ŝtelira [vipero](#) kun palaj kaj pezaj korpo-volvoj glitadis for de niaj piedoj inter la putraj folioj de la vojflanko, aŭ iu enorme granda [sfingo](#) kun mistikaj kaj minac-koloraj makuloj flugis antaŭ ni kaj malaperis en la mallumecon de la ĝangalo. Elvenintaj jam en la duon-lumo, gradetaj purpuraj [kiropteroj](#) kun okuloj tiaj, kiaj etaj [rubenoj](#) leviĝis je nia proksimiĝo de la venene aspektaj fruktoj, sur kiuj ili manĝegis, kaj rigardis nin kun [maligna](#) atento dum ili ŝvebis senbrue en la supera aero. Kaj ni sentis, iel, ke ni rigardiĝis de aliaj kaj nevideblaj ĉeestantoj; kaj ia miro kaptis nin, kaj malpreciza timo pri la monstra ĝangalo; kaj ni ne plu parolis voĉe, aŭ ofte, sed nur en maloftaj flustroj.

Inter aliaj aferoj, ni iamaniere akiris laŭlonge de nia vojo grandan ledan botelon, kio plenis de [arekaca](#) likvoro. Kelkaj trinketoj de la arda likvoro jam servis pli ol unufoje por malpezigi la tedecon de nia vojaĝo; kaj nun ĝi estos helpanta nin multe. Ambaŭ el ni trikis liberan porcion, kaj post nelonge la ĝangalo fariĝis malpli timinda; kaj ni pensis scivole pri kial ni estis permesintaj la silenton kaj mallumon, la rigardantajn kiropterojn kaj la superklinantan amasecon, ke ili subenpremu peze al niaj spiritoj eĉ dum mallonga tempo; kaj mi pensis, ke post dua trinkego ni eĉ komencis kanti.

Kiam krepusko venis, kaj kreskiĝanta luno brilis alte en la ĉielo, post kiam la kaŝita tag-stelo estis subirinta, ni tiam estis tiel inspiritaj per fervoro por la aventuro, ke ni decidis puŝi nin plu kaj atingi Komoriomon tiun saman nokton. Ni vespermanĝis sur manĝaĵo, kion ni estis prenintaj impoŝte de la kamparanoj, kaj la leda botelo transdoniĝis inter ni kelkajn fojojn.

Tiam, multe fortigitaj, kaj ja plenaj de la fortikeco kaj la braveco de alta enpreno, ni rekomencis nian veturon.

Restis al ni ja malmulta distanco trandironta. Eĉ dum ni estis disputantaj inter ni mem, kun tia ardo, kia faris nin senatentaj pri nia longa trairado, pri kiaj altvaloraj ŝtelaĵoj ni unue elektos inter ĉiuj el la mitaj trezoroj de Komoriomo, ni tiam vidis en la lunlumo la rebrilon de marmoraj kupoloj super la arbosuproj, kaj poste inter la branĉoj kaj trunkoj la palajn kolonojn de ombrohavaj [portikoj](#). Je kelkaj paŝoj pluaj, kaj ni surpaŝis la pavimitajn stratojn kiuj etendiĝis krucire de la alta vojo, kiun ni estis sekvintaj, enire al la alta, luksa arbaro ambaŭflanka, kie la folio-tufoj de [mamutaj](#) arekac-[filikoj](#) superis la tegmentojn de la antikvaj domoj.

Ni paŭzis, kaj refoje la silento de pliaĝa senhomeco kaptis al ni la lipojn. Ĉar la domoj blankis tiel, kiel [sepultejoj](#), kaj la profundaj ombroj kuŝintaj ĉirkaŭ kaj sur ili estis malvarmaj kaj minacaj kaj misteraj tiel, kiel la ombro de morto mem. Ŝajnis, ke la suno ne estis povinta lumi sur ilin jam dum epokoj en tiu ĉi loko — kaj nenio pli varmota ol la fantomaj lumstrioj de la kadavra luno estis tuŝintaj la marmoron ek de tiam, kiam tiu universala migrado instigita de la aŭguro de la Blanka Sibilo de Polariono.

“Mi sopiras, ke estus taglume,” murmuris Tiroŭv Ompalioŝ. Liaj malaltpiĉaj tonoj estis strange siblaj, preternature aŭdeblis en la morta senmoveco.

“Tiroŭv Ompalioŝ,” mi respondis, “Mi fidas, ke vi ne fariĝadas [superstiĉa](#). Mi ja malŝatus pensi, ke vi viktimiĝas al la infanecaj imagaĵoj de la plimulto. Malgraŭ tio, lasu, ke ni prenos pluan drinkon.” Ni pli malpezigis la ledan botelon multe pro la postulo, kion ni faris al ĝia enhavo, kaj estis mirinde pli feliĉigitaj tial — tiom multe, ja, ke ni tuj komencis esplori la maldekstran [avenueon](#), kio, kvankam ĝi estis dezajnita kun matematika rekteco, malaperis post ne tre multa distanco inter la foliotufaj arboj. Ĉi tie, iom malproksima de la aliaj konstruaĵoj, en ia placo kion la ĝangalo tute ne konkeris, ni trovis etan templon el antikva arĥitekturo, kiu impresis pri multe plia antikveco ol la liaj konstruaĵegoj. Ĝi ankaŭ malsamis

de ili je sia materialo, ĉar ĝi konstruiĝis el malhela **bazalta** ŝtono multe surkreskata de liĥenoj, kiuj ŝajnas el sama antikveco. Ĝi estis kvadrata laŭ formo, kaj havis nek kupolojn, nek pinto-turojn, kaj havis nur kelkajn mallarĝajn fenestrojn kiuj altis super la grundo. Tiaj temploj estas raraj en Hiperborio nuntempe; sed ni rekonis ĝin por sanktejo de Caĥhagŭo, unu el la antaŭ-epokaj dioj, kiu ne plu ricevas adoron de homoj, sed pri kiu oni diras, ke antaŭ liaj cindraĵoj, la ŝteliraj kaj ferocaj bestoj de la ĝangalo, la **primatoj**, la giganta **bradipo**, kaj la long-denta tigro, foje vidiĝis fari riverencon kaj aŭdiĝis **hurle** aŭ ĝeme oferi siajn nekompreneblajn preĝojn.

La templo, kiel la aliaj konstruaĵoj, estis en stato de preskaŭ tute perfekta konserviĝo: la nuraj signoj de putriĝo estis en la gravurita **lintelo** de la pordo, kio estis peciĝinta kaj splitinta en kelkaj lokoj. La pordo mem, farita el malhela bronzo tute surverdiĝinta pro tempopaso, staris iomete malfermita. Sciante, ke decas esti juveligita idolo interne, tio sen eĉ mencii la diversajn altar-objektojn el valoraj metaloj, ni sentis la urĝon de tentado.

Konjektintaj, ke forto eble bezoniĝos por malfermi la **verdigre** kovritan pordon, ni drinkis profunde, kaj poste aplikis nin mem al la takso. Kompreneble, la **ĉarniroj** havis ruston; kaj nur per strebado de fortikaj kaj muskolaj puŝegoj okazis fine, ke la pordo komencis moviĝi. Kiam ni renovigis niajn strebojn, ĝi svingiĝis malraĝide internen kun terura gratado kaj grincado kiuj plilaŭtiĝis ĝis preskaŭ voka kriaĝo, en kio ni ŝajne aŭdis la tonojn de ia malhoma estulo. La nigra interno de la templo larĝis oscede antaŭ ni, kaj el ĝi ondis **mucida**odoro de longe enkarcerigita aero kune kun stranga kaj malfamiliara **fetoreco**. Al tiu ĉi, tamen, ni donis malmultan atenton en la natura ekscitiĝo de la momento.

Kun mia kutima antaŭrigardo, mi jam provizis min per peco de rezina ligno pli frue tiun tagon, pensante, ke ĝi eble servos kiel torĉo okaze de ebla nokta esploradoj de Komoriomo. Mi ekbruligis tiun ĉi torĉon, kaj ni eniris la sanktejon.

La loko estis pavimita per grandegaj kvinangulaj plafon-ŝtonoj el la sama materialo el kio estis konstruitaj ĝiaj muroj. Ĝi estis tre senobjekta,

escepte pro la figuraĵo de la dio surtrona ĉe la malproksima fino, la du-etaĝa altaro el obscene figurigita metalo antaŭ la dia figuro, kaj granda kaj kurioze aspekta baseno el bronzo subtenata de tri gamboj, kiuj okupis la mezon de la planko. Donante al tiu ĉi baseno nur eka rigardeto, ni kuris antaŭen, kaj mi puŝis mian torĉon al la vizaĝo de la idolo.

Mi estis neniam antaŭe vidinta figuron de Caĥhagŭo, tamen mi rekonis lin sen malfacilo pro la pridiroj, kiujn mi estis aŭdinta. Li estis tre malalt-dika kaj ŝvel-ventra, lia kapo estis pli tia, kia tio de monstra [bufo](#) ol tio de dio, kaj ĝia tuta korpo kovriĝis de [imitaĵo](#) de mallonga felo, donante iel malprecizan sugeston de kaj kiroptero kaj bradipo.

Liaj dormemaj palpebroj duone kovris la globajn okulojn; kaj la pinto de strangeta lango elstaris de lia grasa buŝo. Prave, li ne estis bele aŭ persone loga tipo de dio, kaj mi neniel scivolis pri la ĉesiĝo de lia adorado, kio nur povus plaĉi al tre brutaj kaj praaĵ homoj je ajna tempo.

Tiroŭv Ompalioŝ kaj mi komencis blasfemi samtempe per la nomoj de pli kulturitaj kaj civilizitaj dioj tiam, kiam ni vidis, ke ne eĉ la plej ordinaraĵ el iomete valoraj juveloj videblis ie ajn, nek sur ne interne de ajn parto aŭ membro de tiu ĉi malbeninda figuro.

Kun avarego preter egalebleco, eĉ la okuloj estis gravuritaj el la sama malbrila ŝtono kiel la certero de la abomeninda afero; kaj buŝo, nazo, oreloj kaj ĉiuj aliaj [orificoj](#) estis senornamaj. Ni povis nur miri pri la avaro aŭ malriĉeco de la estuloj kiuj estis skulptintaj tiun ĉi [unikan](#) bestulon.

Ĉar nun niaj mensoj ne plu estis kaptitaj de la espero pri tujaj riĉecoj, ni fariĝis akre konsciaj pri nia ĉirkaŭa kondiĉaro ĝenerale; kaj aparte ni notis tiun malfamiliaran fetoron pri kiu mi menciis antaŭe, kio nun pliĝis malkomfortige en sia fortenco. Ni trovis, ke ĝi elvenis de la bronza baseno, kion ni poste iris por ekzameni, kvankam sen ajna ideo, ĉu la ekzameno estos profitodona aŭ eĉ plaĉa.

La baseno, mi jam diris, estis tre granda; ja, ĝi larĝis je ne malpli ol ses **futojn** laŭ diametro, tri laŭ profundo, kaj ĝia rando altis je ŝultro de viro super la planko. La tri kruroj kiuj subtenis ĝian pezon estis kurbaj kaj masivaj kaj finiĝis en kataj piedoj montrantaj la ungojn. Kiam ni alproksimiĝis al ĝi kaj enrigardis de super la rando, ni vidis, ke la bovlo pleniĝis de iu speco de **viskoza** kaj duon-likva substanco, tute **opaka** kaj el cindra koloro. Estis ĉi tie, el kio venis laodoro — odorokio, kvankam nesupereble fia, estis tamen ne odorokio de putiĝado, sed similis anstataŭe al laodoro de iu aĉega kaj malpura kreitulo el la marĉoj. Laodoro estis preskaŭ maltolerebla, kaj ni pretis tiam turniĝi for, kiam ni perceptis etan boletiĝon ĉe la surfaco, kvazaŭ la cindra livo turne kirletiĝis de interne de iu subsurfaca besto aŭ alia estulo.

La boletiĝado plifortiĝis rapide, la centro ŝveliĝis kvazaŭ pro la agado de iu potenca **gisto**, kaj ni rigardis en plena hororo dum maldecega senforma kapo kun malbrilaj kaj ŝvelaj okuloj leviĝis grade sur ĉiam plilongiĝanta kolo, kaj fikse rigardis nin rekte al la vizaĝoj kun praa maligno. Tiam du brakoj — se oni rajtas nomi ilin brakoj — same leviĝis iomete post iomete, kaj ni vidis ke la estaĵo estis ne, kiel ni estis pensintaj, kreitulo subigita en la likvo, sed ke la likvo mem estis elmetanta tiujn ĉi horore malbelajn kolon kaj kapon, kaj estis nun formante tiujn damnindajn brakojn, kiu etendiĝas cele antaŭen al ni kun **tentakl**-similaj membroj anstataŭ ungoj aŭ manoj! Timo tia, kian ni neniam antaŭe spertis eĉ en sonĝoj, pri kiu ni trovis dum niaj plej danĝeroplenaj ekskursoj, rabis al ni la kapablon de parolado, sed ne de moviĝo. Ni risortis kelkajn paŝojn for de la bovlo, kaj koincide kun niaj paŝoj, la horora kolo kaj brakoj daŭre plilongiĝadis. Poste la tuta maso de la malhela fluido komencis leviĝi, kaj multe pli rapide ol fluas la sŭava suko el mia plumo, ĝi verŝiĝis transire super la rando de la baseno tiel, kiel fluego de nigra **hidrargo**, prenante tiam, je kiam ĝi atingis la plankon, onde serpentan formon kiu tuj kreskigis pli ol dek du mallongajn gambojn.

Pri kia neimagebla hororaĵo el **protoplasma** vivaĵo, kia abomeninda naskulo el la praa ŝlimo estis alveninta por kontraŭstari nin, tion ni ne

paŭzis porkonsideri aŭ konjekti. La monstraĵo estis tro horora por permesi eĉ mallongan pripensadon; ankaŭ, ĝiaj intencoj estis ja memevidente minacaj, kaj ĝi montris evidentecon pri [antropofaga](#) inklino; ĉar ĝi serpentis al ni kun nekredebla rapido kaj movada facileco, malfermante dum sia alveno sendentan buŝon el mirinda kapacito. Dum ĝi malfermis al ni, montrante langon kiu malvolviĝis tiel, kiel serpento, ĝia mandiblo plimalfermiĝis kun la sama ekstrema elasteco kio akompanis ĉiujn ĝiajn aliajn moviĝojn. Ni vidis, ke nia eliro de la sanktejo de Caŝhagŭo jam fariĝis plej deviga, kaj turniĝante la dorsojn al la abomenindaĵoj de tiu malsankta adorejo, ni transiris la sojlon kun unu saltego, kaj kuris impete en la lunlumo tra la ĉirkaŭurboj de Komoriomo. Ni turniĝis je ĉiu konvena angulo, ni retroiris sur la propraj paŝmarkoj malantaŭ la palacoj de jam delonge forgesitaj nobluloj kaj la staploj de nepriskribitaj vendistoj, ni elektis prefere tiujn placojn kie la invadaj ĝangalaj arboj estis plej altaj kaj plej densaj; kaj je fine, sur flank-vojo kie la urborandaj domoj ne plu videblis, ni paŭzus kaj riskis rigardi retroen.

Niaj pulmoj netolereble trolaboris, estis proksimaj al kreviĝo pro siaj heroaj strebegoj, kaj la diversaj lacigoj de la tago jam prenis de ni ja tro bedaŭrinde; sed kiam ni vidis, tuj malantaŭ ni la nigran monstron, sekvanta nin per serpenta kaj ondanta facileco, kiel inundo kiu descendas longan deklivon, niaj elĉerpitaj membroj estis mirinde revivitaj, kaj ni plonĝis elde la perfida lumo de la flankvojo en la senvojan ĝangalon, esperante, ke ni evitu nian ĉasanton en la labirinto el arbotrunkoj kaj grimpoplantoj kaj gigantaj folioj. Ni stumbladis ĉe radikoj kaj falintaj arboj, ni ŝiris niajn vestarojn kaj tranĉis la haŭton sur sovaĝaj dornoj, ni [koliziis](#) en la mallumeco kontraŭ grandegajn arbotrunkojn kaj malrigidajn arbidojn kiuj fleksiĝis antaŭ ni, ni aŭdis la sibladon de la arbo-serpentoj kiuj kraĉis sian venenon al ni de la branĉoj superaj, kaj la gruntado aŭ hulado de neviditaj bestoj kiam ni surpaŝis ilin en nia pelegita kurego. Ni ne plu kuraĝis riski aŭ haltiĝon aŭ retroan rigadon.

Devas esti, ke ni daŭrigis nian hastan celomankan forkuregadon dum horoj. La luno, kio donis al ni malmultan lumon je la plej bonaj tempoj tra

la peza foliaro, falis pli kaj pli suben inter la enorme-foliaj arekacoj kaj interplektiaj grimpoplantoj. Sed ĝiaj finaj lumstrioj, kiam ĝi sinkis, estis la ununura savilo kio avertis nin kontraŭ aĉa marĉo kun rondaĵoj kaj tufaĵoj de marĉ-kaŝa herbo, inter kies danĝeroplana ĉirkaŭaĵo kaj laŭlonge de kies [haladza](#) rando ni estis devigita kuri sen aŭ paŭzo aŭ hezito aŭ tempo por elekti niajn paŝojn, kun nia damninda ĉasanto hunde sekvanta niajn ĉiujn paŝojn.

Nun, post subiris la luno, nia forkuro fariĝis pli sovaĝa kaj pli hazarda — vera deliro el teruro, elĉerpiĝo, konfuzo, kaj senesperige malfacila antaŭiro inter la obstakloj al kiuj ni ne plu donis ajnan atenton aŭ pripensadon, tra tute nokto kio adheris al ni kaj obstaklis al ni tiel, kiel malbonega ŝarĝo, kiel la rezistado de monstra araneaĵo. Ŝajnis, ke la kreitulo malantaŭ ni, kun sia nekredeblaj facilecoj de movado kaj mem-plilongigo, estus povinta kapti nin je ajna tempo; sed ŝajni ĝi deziris plilongigi la ludon. Kaj tial, en duon-eterna etendiĝado de finomankaj hororoj, la nokto daŭris plu ... sed ni neniam kuraĝis riski halton aŭ retroan rigardon.

Malproksime kaj malforte, briletada krepusko kreskiĝis inter la arboj — aŭguraĵo pri la kaŝita mateno. Pli lacaj ol mortintoj, kaj sopirantaj pri ajna ripozo, ajna sekuro, eĉ tiu de iu neidentigebla tombo, ni kuris al la lumo, kaj stublis elde la ĝangalo sur pavimitan straton inter konstruaĵoj el marmoro kaj granito. Malkare, malsprite, sube de la premego de nia laciĝo, ni komprenis, ke ni estis vagintaj laŭ cirklo kaj revenis al la antaŭ-urbejo de Komoriomo. Antaŭ ni, nr pli malproksima ol la ĵet-distanco de ĵet-[lanco](#), estis la malhela templo de Caĥhagŭo.

Refoje ni riskis retroan rigardon, kaj vidis la elastan monstron, kies gamboj nun estis plilongiĝintaj ĝis ĝi superstaris nin ture, kaj kies malferma buŝo larĝis sufiĉe por gluti nin ambaŭ kune. ĝi sekvis nin kun senlaca glitado, kun certeco de movado kaj celo tro horora, tro cinika por esti tolerataj. Ni kuris en la templon de Caĥhagŭo, kies pordo ankoraŭ restis malferma tiel, kiel ni ĝin lasis, kaj fermante la pordon malantaŭ ni kun

timoplena hasto, ni sukcesis, en la superhoma fortenco de nia senesperigo, puŝi ŝlose unu el la rustaj pord-stangoj.

Nun, dum la malvarmeta senkoloreco de sunleviĝo faladis suben kiel mallarĝaj lumstrioj tra la fenestroj altaj en la muro, ni provis kun vere heroa akceptemo por kvietigi nin mem, kaj atendis por kio ajn la destino alportos. Kaj dum ni atendis, la dio Caĥhagŭo rigardadis suben al ni kun eĉ pli da [imbecila](#) malaltdikeco kaj aĉegeco kaj besteco ol li estis tiam montrinta en la torĉlumo.

Mi pensas, ke mi jam diris, ke la lintelo de la pordo estis jam dispeciĝinta en kelkaj lokoj. Fakte, la komenco de ruiniĝado jam estis farinta al pi tri aperturojn, tra kiuj la taglumo nun filtriĝis, kaj kiuj estis sufiĉe grandaj por permesi la eniron de malgrandaj bestetoj kaj grandaj serpentoj. Iukiale, niaj okuloj logiĝs al tiuj aperturoj.

Ne longe ni rigardis tien antaŭ ol la lumo subite obstakliĝis ĉe ĉiuj tri aperturoj, kaj poste, nigra materialo komencis verŝiĝi tra ili kaj fluis suben laŭ la pordo en triobla rivereto al la pavim-ŝtonojn, kie ĝi re-kuniĝis por formi la estaĵon kiu estis ĉasinta nin.

“Adiaŭ, Tiroŭv Ompalioŝ,” mi kriis, kun tia restanta spirkapablo kion mi povis elvoki.

Tiam mi kuris kaj kaŝis min malantaŭ la figuro de Caĥhagŭo, kio grandis sufiĉe por ŝirmi min elde vido, sed, malfortune, tro malgrandis por servi tiel al pli ol unu persono. Troŭv Ompalioŝ estus antaŭirinta min kun la sama laŭdinda ideo pri memsavado, sed mi estis la pli rapida. Kaj vidante, ke ne estis spaco por ambaŭ el ni ĉe la malantaŭo de Ciĥhagŭo, li respondis al mia saluto kaj grimpis en la grandan bronzan basenon, kio sola povis provizi momentan kaŝon en la mankeco de la sanktejo.

Strebe rigardante de malantaŭ tiu abomeninda dio, kies sola merito estis la larĝecoj de lia abdomeno kaj liaj femuroj, mi observis la farojn de la monstro. Pasis apenaŭ momento post kiam Tiroŭv Ompalioŝ kaŭris suben

en la tri-pieda bovlego, ke la sennoma enormaĵo levis sin tiel, kiel cindra kolono kaj aliris la basenon. La kapo estis nun ŝanĝiĝinta laŭ formo kaj loko, ĝis ĝi estis nenio pli ol malklara impresio de aspektoj sur la mezo de korpo sen brakoj, gamboj aŭ kolo. La estaĵo turis super la rando dum momento, entiranta al si ĉiom da sia masiveco sur ia speco de pintiĝanta vosto, kaj tiam kiel antaŭenkurbiĝanta ondo ĝi falis en la bovon sur Tiroŭv Ompalioŝ. Ĝia tuta korpo ŝajnis malfermiĝi kaj formi grandegan buŝon dum ĝi sinkis suben elde vido.

Apenaŭ kapabla spirado pro mia hororo, mi atendis, sed nek sono, nek moviĝo venis el la baseno — nek eĉ ĝemo de Tiroŭv Ompalioŝ. Fine, kun senlima malrapideco kaj timo kaj zorgo, mi riskis elveni de malantaŭ Caĥhagŭo, kaj pasante preter la bovlon ŝtelirante sur piedfingroj, mi sukcesis atingi la pordon.

Nun, por eskapi cele al libereco, estus necese tiri flanken la stangon kaj malfermi la pordon. Kaj tion ĉi mi ege timis fari pro la neevitebla bruoj. Mi sentis, ke estus ja tre malsaĝe, ke mi maltrankviligos la estulon en la bovlo dum ĝi estis digestanta Tiroŭvon Ompalioŝon; sed ŝajnis estis nenia alia rimedo se mi volus iam ajn foriri la abomenindan templeton.

Eĉ dum mi ekpuŝis flanken la stangon, sola tentaklo risortis elen kun infera rapideco el la basenon, kaj, plilongigante sin mem trans la tutan ĉambron, ĝi ĉirkaŭis al mi la dekstran pojnnon kun mortiga tenego. Ĝi malsamis al io ajn kion mi antaŭe tuŝis, ĝi estis nekredeble viskoza kaj ŝlimeca kaj malvarma, ĝi estis abomeninde malfirma tiel, kiel la aĉa ŝlimo de marĉo kaj morde akra tiel, kiel rando de tranĉilo, kun dolorega suĉo kaj kunstriktiĝo tiaj, ke kaŭzis min kribri laŭte dum la tenego ĉirkaŭe striktiĝis al mia karno, tranĉante al mi tiel, kiel ŝraŭbtenilo farita el tranĉilo-klingoj. Dum mia baraktado cele al sinliberigo, mi tiris malferme la pordon, kaj falis antaŭen sur la sojlon. Estis momento de terura doloro, kaj tiam mi atentis pri tio, kie mi estis eskapinta de mia kaptinto. Sed rigardante suben, mi vidis ke la mano malestis, lasante nur velkintan stumpon elde kio malmulta sango elvenis. Tiam, rigardante malantaŭen en la templeton, mi vidis la tentaklon retiriĝi kaj mallongiĝi ĝis ĝi pasis elde vido malantaŭ la rando de

la baseno, portanta mian perditan manon por kuniĝi kun kio ajn nun restis de Tiroŭv Ompalioŝ.



Vortaro

abmomen/i (tr)

- 1** Malamegi pro fizike naŭzaj ecoj.
- 2** Malamegi pro morale tre malplaĉaj ecoj.

arekac/o 🌴 Lignecaj plantoj, kun karakterizaj folitufo. Ili preferas la akvoriĉajn kaj varmajn regionojn, tiel ili troviĝas plej ofte en la tropikoj kaj subtropikoj lokoj.



antropofag/o Iu aŭ io ajn, ĉu homo, ĉu besto, ĉu mita monstro, kio manĝas la karnon de homo.



arĥeolog/o Fakulo pri arkeologio.

~io Scienco pri la monumentoj kaj artoj de la antikva epoko.

avenu/o Larĝa strato, ambaŭflanke borderita per arboj, ĝenerale kun perspektivo al monumento aŭ pejzaĝo. 📖 aleo, bulvardo.

bazalt/o ⊕ Vulkana petro el la gabra grupo, nigreta, konsistanta el pasto (precipe etkristala, kun malmulte da vitro) kaj malmultaj grandaj kristaloj, precipe pirokseno kaj plagioklazo.



bradip/o ♂ Genro (Bradypus) de S-Amerikaj mamuloj el la ordo de ksenartroj, kun tre longaj membroj, trifingraj kaj fortaj ungegoj, kiuj vivas pendante kaj malrapide grimpante sub arbobranĉoj.



giganta ~o praa bradipo el enorma grandeco.

buf/o ♂ Genro (Bufo) de anuroj similaj al rano, sed kun mallongaj kruroj, veruka haŭto kaj sen dentoj. 📖 amfibioj, hilo, salamandro, trituro.



ĉarnir/o 🔩 Metalaĵo, konsistanta el du platoj, kunligitaj per komuna akso, ŝraŭbitaj sur la fiksa parto de meblo, kofro ks, respektive sur la pordo aŭ kovrilo, kaj ebliganta ties malfermon. 📖 pordhoko, kardino, pivoto.



filik/o 🌿 Plurjara herbo aŭ arbo, ĝenerale kun rizomo, kun folioj junstadie spirale envolviĝaj, kies malsupra flanko maturstadie portas dehiskemajn sporujojn ariĝintajn en sorojn kaj kies limboripoj disbranĉiĝas.



fetor/o Tre malagrabla, naŭzaodoro, kiel de putro kaj similaj. 🗣️ haladzo, miasmo.

fut/o Antikva mezurunuo de longo: 0,304 m. 🗣️ colo, lineo.

metro
futo

gist/o

1 Unuĉela fungo (precipe la biera sakaromiceto), kiu estigas la alkoholan fermentadon de sukeraĵoj (i.a. mosto) kaj ŝveligas paston.

2 🌿

a) Striktasense: sakaromiceto, pli speciale la biera sakaromiceto.

b) Vastasence: unuĉela, burĝonanta fungo el iuj askomikotoj (i.a. sakaromiceto), iuj bazidimikotoj aŭ iuj mitozosporaj fungoj.



glace/a 🇹 Ricevinta apartan brilan aspekton per polurado aŭ glatigado. 🗣️ glazuro.

~o Brila aspekto de glaceaj substancoj.

granat/o 🍁 Frukto de granatujo; bero pomgranda, kun ledeca ŝelo, enhavanta multajn manĝeblajn, purpuretajn semojn, uzatajn por farado de granatsiropo.



granit/o ⊕ Plutona petro, grajna, acida, precipe konsistanta el feldspato, kvarco kaj glimo. 🗑 sienito, gnejso, porfiro.



haladz/o

1 Malbonodora toksa gaso, eliĝanta el brulanta korpo. 🗑 mingaso.

2 Malbonodora, malsaniga gaso, eliĝanta el putraĵo ktp. 🗑 miasmo.



hidrarg/o Ⓚ

1 Elemento, Hg, atomnumero 80.

2 Metallo arĝentokolora, fluida je la ordinara temperaturo, kaj uzata por fabrikado de speguloj kaj sciencaj aparatoj.



hurli (ntr) Bleki kiel lupoj.



idol/o Statuo, prezentanta dion de religio aŭ kulto, al kiu adorantoj riverencas kaj faras oferojn.



ignam/o 🍁 La tuberoj aŭ aeraj bulbiloj de dioskoreo (precipe de Dioscorea alata kaj de D. batatas), manĝataj kuiritaj pro enhavo de dioskoreino.



imbecil/o 🦋 Homo kun inteligento-kvociendo inter 60% k 40 %. Alivorte, tre stulta.

imit/i (tr)

1 Agi tiel same, kiel alia persono.

2 Fari objekton tute similan al alia objekto, rigardata kiel modelo. 📄 kopii, pastiči, parodii, plagiati.

~aĵo Io imitita. 📄 faksimilo, falsaĵo.

kiropter/o ♂ Ordo (Chiroptera) de malgrandaj flugkapablaj, kun haŭta flugilo inter la fingroj, kruroj kaj vosto.



kolizi/i (ntr) Renkontiĝi kaj fortege tuŝegi sin reciproke 🚗 karamboli.



kupol/o 🏰 Tegmento de konstruaĵo en formo de renversita kaliko.



labirint/o Implikita, neregula interplektaĵo de vojoj, el kiu estas malfacile trovi eliron sen gvido.

~a Implikita kiel labirinto.



lanc/o Batalilo, konsistanta el longa ligna stango kaj akra ferpinto, uzata de makedonaj falangistoj, de Mezepokaj kaj modernaj kavalerianoj kaj similaj.



lazzur/o


1 Blua koloro de la ĉielo aŭ de Mediteraneo.

2 🏴 Bluo.


3 Sennuba ĉielo.

~a Ĉiele blua.

lintel/o 🏛️ Ŝtona, betona, ligna aŭ fera trabo, bloko horizontale metita sur la fostoĵoj de fenestro aŭ pordo. 🏠 soĵlo.



lum-flam-ing/o Inĝon por teni flamon servantan kiel lum-fonto. Uzata precipe en antikvaj tempoj.



malign/a Havanta malbonan prognozon.

mamut/o 🦴 Genro (Mammuthus) de fosiliaj elefantedoj, diversgrandaj, kun du longaj, suprenkurbaj dentegoj en la supra makzelo; vivis dum pleistoceno en arktaĵaj regionoj de Eŭrazio kaj N Ameriko. 🐘 dinoterio, mastodonto.

~a (f) Grandega. → kolosa.



marmor/o ⊕ Polurebla kalkpetro, tute grandkristala, ofte enhavanta kolorajn vejnojn pro malpuraĵoj, uzata en konstruado kaj skulpturo.



mastodont/o 🦴 Genro (Mastodon) de mamuloj el la familio de elefantedoj, kiuj vivis en terciaro (mioceno kaj plioceno). 🐘 dinoterio, mamuto.



maŭzole/o Grandioza tomba konstruaĵo.



medalion/o

1 Juvelo en formo de plata malfermebla skatoleteto, kiun oni ordinare portas per ĉeno ĉe la kolo kaj en kiu oni konservas portreton, harojn kaj cetere.

2 ☆ Rondforma aŭ ovala bareliefo kun figuraĵo.



mucida Havanta ŝiman odoron aŭ guston.

mumi/o Kadavro, konservita per balzamaj procedoj kaj/aŭ pro manko de aero.



obelisk/o Monumento, plej ofte el unusola ŝtono, pritrancita en formo de kvarangula pinta kolono.



opak/a 🚫 Maldiafana, ne tralasanta la lumon.

orific/o ♥ Enira aŭ elira aperturo.

portik/o 🏛 Porĉo kun alero, ekipita en ambaŭ flankoj per subtenaj kolonoj.



primat/o ♂ Ordo (Primates) de mamuloj, havantaj nur ok incizivojn kaj antaŭenrigardantajn okulojn, ampleksanta la subordojn de prasimioj kaj de simioj.



plasm/o

1 ♂ La likva parto de sango, en kiu naĝas blankaj kaj ruĝaj globetoj. ☞ sero.

2 ♂ Fluida interna parto de ĉelo (ĉelplasma) aŭ de ties nukleo (nukleoplasma).

3 ☐ Substanco je tiom alta temperaturo, ke elektronoj disiĝas de la nukleoj.

proto~ ♂ La viv-esenca substanco de ĉelo, konsistanta el ĉelplasma kaj nukleo. ☞ ĉelplasma, nukleo, nukleolo.



redukt/i (tr)

1 Alkonduki al malpli grandaj proporcioj, dimensioj kaj simile, konservante tamen la ĝeneralan originan strukturon. ☞ limigi.

2 (f) Alkonduki al malpli bona aŭ malpli libera stato.

ruben/o ⊕ Diafana, ruĝa varrio de korundo, uzata kiel juvelŝtono kaj en horloĝmuntado.



sepult/i (tr) Prizorgi kadavron laŭ unu el la tradiciaj procedoj.

~ado Ĉia maniero, kiel oni prizorgas la korpon de mortinto, aŭ per forlasado, entombigo, kremacio, mumiigo aŭ senkarnigo.

~ejo Loko, kie estas konservataj la restaĵoj de mortinto.



sfing/o ♂ Genro (Sphinx kaj parencaj genroj) de grandaj noktpapilioj, kiuj dum ripozo tenas la flugilojn horizontale, kaj kies larvoj havas dorsan kornon sur la malantaŭa parto de la abdomeno kaj vivas sur diversaj plantoj.



sukcen/o Malmola flava diafana fosilia rezino, el kiu oni faras diversajn objektojn.

~a

1 Farita el sukceso.

2 Havanta la koloron de sukceso.



superstiĉ/o Psika sinteno, kiu rigardas aŭgursignifaj iujn ceremoniojn, gestojn kaj similajn aŭ iujn hazardajn okazaĵojn.

tentakl/o ♂ Dika palpfadeno ĉe la kapo aŭ ĉirkaŭ la buŝo de diversaj primitivaj animaloj, ekzemple hidroidoj, anelidoj, cefalopodoj.



tribut/o

1 Sumo da mono aŭ kvanto da valoraĵoj, periode pagata de princo, tribo, regno kaj simile, kiel signo de dependeco, aŭ kompenso pro protekto, aŭ sekve de traktato.

2 Ĉio, kion oni donas, faras, liveras kiel ateston de respekto kaj similaj.

unik/a Sola laŭ sia kvalito; ne havanta alian egalan aŭ similan.

velen/o Por skribo preparita bovida felo, pli delikata ol pergameno.




verdigr/o (K)

1 Kupra oksido, havanta pale bluan koloron.

2 🖐 Alkala kupra acetato.

~a Kovrita de verdigro.



viper/o ♂ Reptilio (Vipera) el la subordo de serpentoj, ovovivonaska, kun tubformaj venendoj antaŭe en la supra makzelo.



viskoz/a □ Malfacile fluanta, siropeca
alteniĝema, kiel la fruktosuko de visko.



Katalogo de Senpagaj Bitlibroj

<http://esperanto.us>



Jack Vance *romanoj*

Mazirien la Magiisto

Klasika serio, *La Mortanta Tero*, volumo unu. Ses interligitaj noveloj pri la fintempo de la Tero, kiam magio superas ol scienco post ol la luno delonge malaperis kaj eĉ la suno mem ŝvelas ruĝe montante makulajn signojn de baldaŭa mallumiĝo.

Kugel La Ruza

Klasika serio, *La Mortanta Tero*, volumo du. Sep sin-sekvaj noveloj formantaj la duan volumon el la serio 'La Mortanta Tero'. Rakontaro en kiu humore krulea magiisto devigas friponan anti-heroon al grandega aventuro ĉe la fora flanko de l' mondo por plenumi nefareblan mision La aventuroj de Kugel la Ruza iom ŝokas kaj tre amuzas, ambaŭ samtempe.

Kugel: la Ĉielorompa Ŝpruclumo

Klasika serio, *La Mortanta Tero*, volumo tri. Dek tri sin-sekvaj noveloj formantaj la trian volumon el la serio 'La Mortanta Tero'. La dua aventurego de Kugel la Ruza, ĉifoje komencanta per ŝipo.

Jack Vance *noveloj*

Trigamba Joĉjo

Sur planedeto senaera du junuloj alfrontas beston nevenkeblan.

La Luna Sfingo

En kulturo kie ĉiuj portas maskojn, ĵus alveninta diplomato ĉasas murdiston.

Domo de l' Se

Post respondi al reklamo pri aventuro, viro ekfrontas multon pli ol atendite.

Retretejo Ulvarda

Kiam surtere estas 50 miliardoj da homoj, ĉu izoleco dezirindas pli ol ĉio?

Kiam la Kvin Lunoj Leviĝas

Sur planedo havanta kvin lunojn, oni povas fidi pri nenio ajn tiam, kiam la kvin leviĝas samnokte.

Clark Ashton Smith

noveloj

Genius Loci

Terura novelo pri ege malica energio kiu hante loĝas en marĉa lago havanta skelete mortintan salik-arbon.

La Imperio de la Nekromanciistoj

Terura novelo pri du nekromanciistoj kiuj resurektigas armeon el mortintaj ostoj cele por venĝi sin kontraŭ la urbo kio estis pelintaj ilin en tiun saman dezerton.

La Urbo de la Kananta Flamo

Du viroj malaperas. Poste troviĝas taglibro de unu priskribanta pordon al alia dimensio kie estas templo en kiu kantanta flamo vokas senrezisteble al fajra sinmortigo. Trovanto de la taglibro decidas tien esplori.

CAS-bitlibroj laŭplane eldonotaj

La Rakonto de Satampro Zejroŝ

La Malhela Fantomo
La Duobla Ombro
La Sorçado de Ulua

Clifford D. Simak

venonta

Stacidomo

Ricevinto de la Premio Hugo en 1964. Scienc-fikcia romano pri interplanedaj rilatoj kaj konfliktoj en tut-glakasia societo.

Atribuoj

La subaj homoj kontribuis al tiu ĉi traduko, ĉiuj en diversaj tempoj kaj lokoj. Kie mankas indiko pri lando, tio okazis en Usono.

Verkis:

Clark Ashton Smith (1893–1961)

Anglalingva titolo: *The Tale of Samtempra Zeiros*

Permesis:

Dank al William A. Dorman, la literatura postlas-ekonomo Clark Ashton Smith.

Tradukis:

Ĝan Ŭesli Starling

Ilustris:

Richard Svensson *Svedio – la kovrilon*

Kontrolis:

Kontrolistoj invitiĝas — Ĉu eble vi?

Se vi volas kontribui per pluse kontroli, kontaktu min epoŝte laŭ la jena adreso: gan@starling.us

The Tale of Satampra Zeiros © 1931 by Clark Ashton Smith.
© by CASiana, the literary estate of Clark Ashton Smith.

Translated with permission.



Tiu ĉi Esperanta traduko pri *The Tale of Satampra Zeiros* verkita de Clark Ashton Smith estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce-Nemodifite 4.0 Tutmonda.